

Dato de la Jarkunsido

La konsilantaro decidis ke ne indas okazigi jarkunsidon dum la Brita Kongreso, nek je Paska vendredo (kiam la klubo kutime ne kunvenas). En ambaŭ datoj estas granda risiko ke mankos kvorumo. Ne eblas garantii ke la kont-kontrolado estos finita antaŭ la 11-a de marto, kaj ĉar la konsilantaro devas doni prioritaton al la translokiĝo, estas risiko ke la ceteraj raportoj ne estos pretaj por dissendi sufiĉe frue. Okazigi ĝin la 1-an de aprilo ankaŭ donos al membroj 3 anstataŭ 2 eblecojn sperti la novan ejon antaŭ diskuto dum la jarkunsido.

Kluba Programo:**marto:**

- 4 Babil-vespero (ĉe IBIS)
- 11 Renato Corsetti *Esperantistoj en Meza Oriento* (1800h: konsilantaro)
- 18 Babil-vespero (ĉe IBIS)
- 25 Paska vendredo – neniu kunveno

aprilo:

- 1 JARKUNSIDO
- 8 Anna Lowenstein: *Ĉiutaga Vortprovizo* (1800h: konsilantaro)
- 15 Babil-vespero (ĉe IBIS)
- 22 John Wells: *Lingva Seminario*
- 29 Babil-vespero (ĉe IBIS)

majo:

- 6 Babil-vespero (ĉe IBIS)

Esperanta Kalendaro:

18-20 marto 2016: 97a Brita Kongreso de E-o; Liverpool. Informo: www.britakongreso.org
23-30 julio 2016: 101a Universala Kongreso; Nitra, Slovakio. Informo: www.nitra2016.sk; info@esperanto.sk

**Nekrologo**

Jacques Wilfrid naskiĝis la 25an de februaro 1927 en maŭricia ĉefurbo Portluiso (Port Louis). Liaj gepatroj Emmanuel (ŝtata oficisto) kaj Renée (instruistino) havis ses kromajn gefilojn Li edukiĝis unue ĉe monaĥineja lernejo Loreto Convent School, kaj poste ĉe kolegio en

Portluiso. Post la morto de lia patro tio ne plu eblis, kaj Jacques ekposteniĝis en fervoj-entrepreno *Mauritius Railways Company*.

En 1965 Jacques translokiĝis al Londono, fariĝante oficisto ĉe trejnad-konsultistoj *The Industrial Society*. Tiun entreprenon li pluservis dum pli ol tridek jaroj.

Talenta poligloto, Jacques parolis flue la francan, hispanan kaj anglan lingvojn, kaj iom studis ankaŭ germanan kaj italan. Esperanton li eklernis en 1969, kaj poste uzadis ofte dum siaj vizitoj al aliaj landoj. Okaze de la UK en Havano (1990) Jacques ricevis inviton al Akcepto kun la kuba prezidento. Poste li diris kun fiero: “Mi premis la manon de Fidel Castro!”

Tre plaĉis al Jacques aŭskulti klasikan muzikon, precipe la operon. Interesis lin ankaŭ filozofio kaj astronomio, kaj li posedis ampleksan libron. Fidela ano kaj iama Konsilanto de LEK, li estis membro ankaŭ de pluraj aliaj kluboj kaj societoj. Estante aktiva sportemulo, Jacques tre ĝuis ludi tenison, kaj promeni bicikle aŭ piedire en la kamparo.

Jacques partoprenis preskaŭ ĉiujn Universalajn Esperanto kongresojn, plurfoje prelegis pri Maŭricio en Vilnius Esperanto klubo, estis membro de SAT. Preskaŭ ĉiujn vendredojn li pasigis en Londona Esperanto klubo. Jacques multe da jaroj amikiĝis kun alia esperantisto Karlo Bartosik. En sia *Sketchbook*, Karlo desegnis Jacques, kiel iun inter aliaj rimarkindaj figuroj de Londona Esperanto klubo.

Vizitante en 1993 Esperanto-kongreson en Valencio, Hispanio, Jacques renkontis unuafoje samideaninon el Litovio, Rŭta. Lanĉiĝis daŭra gekunuleco, kaj ili poste multe vojaĝadis pare, en Eŭropo, Nord-afriko, Maŭricio. En Londono, dudek du jarojn poste, ili geedziĝis.

En oktobro de jaro 2015, Jacques malsaniĝis neatendite pro apopleksio kaj, malgraŭ ĉiaj klopodoj de kuracistoj kaj flegistoj, forpasis en Queen Elizabeth Hospital, Woolwich. Funebra Meso, en kiu partoprenis multaj kolegoj kaj amikoj liaj, inkluzive membrojn de LEK, okazis la 29an de oktobro, ĉe romkatolika preĝejo de S-ta Benedikto, apud la hejmo de Jacques kaj Ruta en Abbey Wood.

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo *London Overground*: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,
Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,
11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB
01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto:(vaka);

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Roland England, Stan Keable, Olga Kerziouk, Matt Peperell, Antony Rawlinson (Bultenisto), Diana Robin.

Adresoj: David Thornell:lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Venas la Jarkunsido. Ni do mem venu por partopreni ĝin, kun propraj ideoj, proponoj ktp. Jes, la dato de la Jarkunsido estas la 1a de aprilo; sed tio ne estas ŝerco! Certiĝu pri tio, per zorga legado de ĉiuj dokumentoj en la Suplemento, kiu akompanas tiun ĉi Bultenon!



Unu afero certe pripensinda kaj tiurilata estas la nuntempa manko de Honora Vic-Prezidanto, pro la antaŭnelongaj forpaso de niaj karmemoraj **VALERIE ATKINSON** kaj **HUSEJN AL-AMILY**. Taŭgajn individuojn eventuale proponu por kandidatio, mi petas.

Alia temo traktinda estas nia nova ritmo de ĉef-kunvenoj (ĉe Diorama) kaj babilvesperoj (ĉe Hotelo Ibis). Ŝajnas, ke ĉio tio bonstatas, kun denovaj dankoj al **IVOR HUETING** kaj **ARTURO PRENT**, kiuj respektive trovis kaj kaptis nian nuntempan ĉef-kunvenejon. Tamen, la membraro - ĝenerale - reagu kaj rekomendu laŭplaĉe kaj laŭsperte. Oni klopodas fari ŝanĝojn, laŭ la volo kaj deziroj de la membraro. Tial, la Konsilantaro volas kaj deziras aŭdi respondojn al tiuj ŝanĝoj. Kunportu do viajn opiniojn al la Jarkunsido, por ke ili registriĝu protokole.

Pri nia klubo, mi diru ke la ĉeestoj en 2015 pliboniĝis; la diverseco de vizitantoj plivastiĝis laŭlande; la proporcio de kvoromoj en Konsilantaraj Kunvenoj plialtiĝis. Fakte, la kluba vivo viglis kelkflanke dum la antaŭa jaro - kaj ankoraŭ nun.

Ni ja celebru ĉion tion, kun intenco kaj planado plivigliĝu ĉiajn kunvenojn kaj agadojn de LEK en 2016 kaj poste, per Jarkunsido komence de aprilo!

Sincere,

David Thornell